


La serio **MONDLITERATURA**  
de **LF-koop**  
proponas al la Esperanta publiko,  
post la traduka ĉefverko  
de **Kálmán Kalocsay**,  
la perlon de la nordaj literaturoj,  
okaze de la 150<sup>a</sup> datreveno  
de la unua kolekto  
de **Elias Lönnrot**:



per la traduko  
de **J. E. Leppäkoski**,  
kun postparolo de **Vilho Setälä**  
kaj la originalaj bildoj de  
**Akseli Gallen-Kallela**,  
en nova kaj luksa grafika aranĝo.

**Eldonisto: Esperanto-  
Asocio de Finnlando.**

# PLAN LING VISTIKO

trimonata revuo  
por la studo  
de planlingvoj  
n.ro 16  
jaro 4  
vintro 1985

## Ĉefredaktoro

György Nanovfszky

## Redakcio

Tazio Carlevaro, Jouko Lindstedt,  
Giorgio Silfer, István Szerdahelyi

## Eldonas kaj administras / Redaktejo ĉe

 kooperativo de  
literatura foiro

CP 33, CH-12111 Genève 8, Svislando  
pĉk. 12-11114

## en ĉi tiu numero:

La "Pazitelegrafio" de G. I. Ascoli  
de Fabrizio Pennacchietti

Fremdaj elementoj de Esperanto  
de Akiko Nagata

La nuda vero pri la kategorieco de la radikoj  
de Félix García Blásquez

Por kaj Kontraŭ  
de István Szerdahelyi

Horatio Hale kaj Oregon Trade Language  
de Bernard Golden

Nova ŝanco por terminologio  
de Wera Dehler

## Internacia Abontarifo (IT):

15 CHF (unu jarkolekto, ne aervoje)  
La abonantoj de LITERATURA FOIRO  
pagas nur 13,50 svisajn frankojn

Abonkotizo laŭ la landoj  
(la ciferoj referencas al la  
koncerna valuto, parenteze situas  
la tarifo por LF-abonantoj):

Aŭstralio:	7,50	(6,75)
Aŭstrio:	125	(115)
Belgio:	360	(290)
Britio:	4,80	(4,30)
Danlando:	60	(55)
Finnlando:	35	(31)
FR Germanio:	18	(16)
Francio:	50	(45)
Hispanio:	850	(800)
Hungario:	125	(115)
Israelo:	IT	(IT)
Italio:	10000	(9000)
Japanio:	1750	(1600)
Jugoslavio:	300	(270)
Nederlando:	20	(17,50)
Norvegio:	50	(45)
Portugaliao:	600	(550)
Svedio:	50	(45)
Svislando:	IT	(IT)
Usono:	7,50	(6,75)

La listo de perantoj  
troviĝas en la  
interna dorskovrilo

Manuskriptojn kaj recenzotajn  
librojn oni sendu al  
la redaktoro.

Oni recenzas nur la librojn  
ricevitajn en du ekzempleroj:  
la unuopajn ricevitaĵojn  
tamen oni mencias.

La redakcio rezervas al si  
la rajton decidi pri la (ne)  
recenzado de iu ajn verko.

En abonaj kaj administraj aferoj  
bonvolu kontakti nur la eldonejon.  
Dankon.

### La "Pazitelegrafio" (1851) de Graziadio Isaia Ascoli de Fabrizio Pennacchietti

Malmultaj scias ke Graziadio Isaia Ascoli (1829 07 16 — 1907 01 21), la plej larĝvida, fekunda kaj fama itala lingvisto de la pasinta jarcento, okupiĝis pri planlingvaj problemoj kaj mem verkis projekton de pazigrafio aplikita al telegrafio.

Ascoli naskiĝis en Gorizia, urbo tiutempe apartenanta al la Aŭstria imperio, de riĉa juda komercista familio. Lingvistikaj interesoj vekigis en li tre frue, influite de la granda hebrea S.D. Luzzatto kaj de la plurlingva kaj plurkultura medio de Gorizia, renkontopunkto de la lingvoj itala, slovena kaj germana kaj de la dialektoj friula kaj venecia. Dank' al la originaleco kaj metoda rigoro de liaj esploroj en la kampoj de sanskrita filologio, semidaj lingvoj kaj itala dialektologio, oni kreis por Ascoli 32-jara la unuan italan katedron de kompara lingvistiko, en Milano. Ekde tiam lia longa kaj fruktodona aktiveco en lingvoscienco estis akompanata de grandaj rekonaj kaj honoraj naciaj kaj eksterlandaj: li fariĝis honora civitano de Milano, senatano de la itala reĝlando, membro de la ĉefaj akademioj de Eŭropo kaj Ameriko, kaj ricevis elstarajn ordenojn, kiel la "Ordre pour le mérite" de Prusujo, kaj altajn akademiajn premiojn.

La akuta intelekta scivolo de Ascoli kaj liaj vastaj kulturaj interesoj (krom kompara hindeŭropa fonetiko, la sistema esplorado de latinidaj dialektoj kaj la formulado de la principo de lingva substrato, Ascoli sukcese kultivis ankaŭ toponimion, judan epigrafikon, ciganajn dialektojn, la studon de la ĵargonoj ktp) ne povis flankenlasi la problemojn de aplikita lingvistiko celanta al plifaciligado de la interhoma komunikado. Tiu ĉi aspekto de lia scienca engaĝiĝo estis tamen efemera kaj tro dependa de la fervoro de liaj junulaj entuziasmoj.

En 1851, kiam li estis 22-jara, Ascoli eksciis ke telegrafa inspektoro en Vieno, certa S-ro Rad, submetis al la ministro pri komunikigado projekton de universala telegrafia lingvo. Ĉar li mem okupiĝis pri la sama ideo ekde unu semajno, li hastis publikigi sian propran projekton plej rapide kiel eble en templimo de dek tagoj. Tiumaniere aperis la 32-paĝa eseo: *La Pasitelegrafia, Saggio di G.I. Ascoli, Trieste, Tipografia del Lloyd austriaco, 1851*.

Oni povas facile prezenti al si la entuziasmon kiu regis tiutempe pro la invento de elektromagneta telegrafo, tiu revolucia komunikadrimedo kiu ne konas la "malhelpojn de tempo, klimato kaj loko"<sup>1</sup> (Norse ĝin patentigis en 1840), kaj por la instalado de la telegrafaj retoj (la unua linio estis inaŭgurita en 1844 inter Vaŝingtono kaj Baltimoro). Novaj horizontoj sin malfermis akcelante en brilaj mensoj la elpenson de aŭdacaj inventoj kaj projektoj.

La seniluziigo tamen ne atendigis sin longe<sup>2</sup>. Neniu fakte, jen tiam jen poste, degnis ĵeti seriozan rigardon al la propono de Ascoli kaj eĉ nun la biografioj kaj la enciklopedioj apenaŭ mencias aŭ volonte neglektas tiun "kuriozaĵon" de la granda lingvisto<sup>3</sup>.

Ascoli tutsimple rezignis plue okupiĝi pri sia "pazitelegrafio", sed dum kelka tempo, kiel atestas laborprogramo de li farita en 1852, li ankoraŭ revis verki

retrospektivan studon pri pazigrafioj kaj pazilalioj<sup>4</sup>. Tiu revo bedaŭrinde neniam realiĝis.

La supre menciita eseo de Ascoli estas, malgraŭ ĉio, ege interesa el pluraj vidpunktoj. Unue, ĝi bone spegulas la intelektan viklecon kaj la jam profundan erudicion de la juna sciencisto en periodo de lia maturiĝo ankoraŭ markita de peza, antikveca lingvostilo kaj de romantismaj, religiecaj kaj memkritikaj sentoj. Due, ĝi reprezentas atentindan etapon en la historia evoluo de lingvo-inventado kaj lingvo-planado. Trie, ĝi estas unu el la malmultaj italaj kontribuoj al la monda debato pri la problemoj de internacia komunikado en la pasinta jarcento.

Ĝin malfermas 12-paragrafa ĉapitro (*Pasigrafia e Pasilalia*, p. 4-10) kie Ascoli revuas kaj diskutas la ĝistiamajn atingojn en la kampoj de pazigrafio kaj pazilalio, menciante la verkojn de 35 aŭtoroj (ekde Gesner, *Mithridates. De differentis linguarum*, Zürich 1555, ĝis Krause, 1781-1832) kaj montrante ne nur imponan informitecon kaj kritikan klarvidecon, sed la kion de pluraj eŭropaj kaj ekstereŭropaj lingvoj (ekz. sanskrito, hebrea, araba kaj ĉina) kaj jam subtilan lingvosenton.

Sekvas mallonga ĉapitro (*Pasitelegrafia*, p. 10-12) per kiu Ascoli enkondukas la koncepton de *pazigrafio limigita al kelkaj uzoj de la homa socio* kaj aplikota al la antaŭ nelonge inventita telegrafio. La aŭtoro ne kredas je la ebleco de universala lingvo, skriba aŭ parola, konstruota laŭ la rigora sistemo de filozofia kunordigo de la ideoj. (Ĉiujn apriorajn lingvojn jam proponitajn li konsideras tro artefaritaj kaj neeviteble malperfektaj. Li ankaŭ rifuzas la projektojn krei *universalan lingvon por kleruloj* aposteriore, laŭ la modelo de nacia lingvo oportune simpligita: *Jam ekzistas latino!* Krome, se ĝi fariĝus de ĝenerala uzo, ĝi minacis la naciajn lingvojn kaj iliajn literaturojn. Tio, kion male bezonas la nacioj estas *facila vehiklo de reciproka helpo kaj pliriĉiĝo* kiu estu plene adekvata al la rimedoj ofertataj de la moderna teknologio, nome telegrafio.

Nu, efika kaj rapida interŝanĝo de mesaĝoj trans vastegaj regionoj postulas, laŭ Ascoli, tri kvalitojn kiujn li ne trovas en kiu ajn lingvo, eĉ ne en la angla, lingvo de Ascoli eksplicite menciita, kiun oni povus oficialigi kiel universala telegrafia lingvo (kp. la nuntempa rolo de la angla kiel internacia aviad-rafika lingvo). Tiuj kvalitoj estas: 1) facila ellernebleco, en la daŭro de kelkaj horoj, ankaŭ flanke de nekleruloj, kiel ekzemple la telegrafocistoj; 2) kapablo koncize, do ekonomie, sed nemiskompreneble, transdoni sciigojn; 3) utiligeblo ankaŭ ekster telegrafio kiel facila kaj konciza *skriba* rimedo por komuniki sciigojn trans la lingvaj diversecoj.

Kiel oni vidas, Ascoli unuflanke estis ankoraŭ sklavo de la antaŭjuĝo ke universala planita lingvo por internacia uzo parola kaj skriba povus minaci, anstataŭ defendi, la naciajn lingvojn; duaflanke li estis tre konscia ke la moderna teknologio nepre devigas al *racia* solvo de la problemoj de plurlingveco kaj internacia komunikado, kaj tio laŭ kriterioj de efikeco kaj ekonomieco. La starpunkto de Ascoli ne estis do tro malproksima de tiu de la hodiaŭaj informadikistoj, kiuj, antaŭ la defio de la komputoroj, ekkomprenas la operaciajn malavantaĝojn de la naciaj lingvoj kaj pretas akcepti la tezojn de planlingvistiko: por plene utiligi la novajn atingojn de elektroniko oni uzu lingvon adekvatan al la novaj cirkostancoj, t.e. konscie normigitan lingvon.

En la tria kaj fina ĉapitro (*Sistema pasitelegrafico. Saggi di pasitelegrafia*, p. 12-31) Ascoli priskribas sian pazigrafian sistemon kaj per ekzemploj klarigas kiel

ĝi funkcias. Unuavide la pazitelegrafio de Ascoli povas esti rigardata kiel la antaŭveninto de la kodoj uzataj por la telegrafaj korespondoj inter bankoj, hoteloj ktp<sup>5</sup>, sed plie ĝi entenas, kiel Esperanto, la gramatikan analizon de la vortoj, t.e. analizan aparaton per kiu la "ideoj" povas esti diserigitaj kaj ties eroj denove muntataj por konstrui novan pli ampleksan "ideon".

Ĝi konsistas el kodo provizore enlistiganta nur 334 ciferajn signojn, kiuj respondas al same multaj "ideoj" (kp. la radikaron de la E-a Universala Vortaro). La signoj, sub formo de frakcioj (numerato + streko + denominato), distribuiĝas surbaze de funkciaj aŭ semantikaj kriterioj en 8 klasojn markitajn per apartaj numeratoj. Denominato siavice indikas la unuopajn "ideojn" interne de la klas-numerato.

La 8 klasoj aŭ kategorioj de la frakcioformaj signoj por la "ideoj" kaj ties ordigo interne de la kategorioj mem nenion komunan havas kun la komplikaj "ideologiaj" distingoj de la klasikaj pazigrafiaj modeloj de la XVIII-a jarcento. Pragmatisme, Ascoli simple dividas siajn "radikajn ideojn" laŭ kelkaj ĉeftemoj kaj ilin envicigas sen ia antaŭfiksita ordo.

La unua kategorio entenas la signojn por la "rilatoj", t.e. la konjunkcioj, subjunkcioj, pronomoj, prepozicioj kaj kelkaj "tabelvortoj". La ceteraj kategorioj entenas male signojn por ekskluzive substantivaj "ideoj", nome objektoj, agoj kaj kvalitoj kiel *ĉevalo*, *komunikado* kaj *beleco*.

Por kompreni la "mond-rigardon" de Ascoli jam sufiĉas rimarki la ideojn kiuj okupas la unuan lokon en la diversaj signo-klasoj:

- 1-a (gramatikaj rilatoj) - *kaj*;
- 2-a (la medio ĝenerale) - *Dio*;
- 3-a (homo fizike kaj morale kaj ceteraj animaloj) - *homo*;
- 4-a (socia vivo) *komerco*: Ascoli mem junaĝe praktikis komercon;
- 5-a (politika vivo) - *imperio*: aludo al la Aŭstria Imperio?;
- 6-a (produktada vivo) - *scienco*;
- 7-a (dimensioj) - *tempo*;
- 8-a (propraj nomoj) - *Eŭropo*.

Krom la frakcioformaj signoj (facile transskribeblaj per normala morsa alfabeto) kiujn entenas la 8 signo-klasoj, ekzistas aliaj 20 punkto-strekaĵoj signoj (al kiuj respondas grafikaj simboloj: cirklo, vertikalaj kaj horizontalaj streketoj, punkto, dupunkto, minusklaj literoj, diverstipaj krampoj ktp), kies funkcio estas aŭ transformi la substantivajn "ideojn" en adjektivojn, participojn, gerundion, adverbos, infinitivon (kp. E-o -a, -ant, -ante, -e, -i), aŭ marki la feminenon, pluralon, la adjektivajn gradojn, la prezencan, preteritan, futuran, volitivon kaj kondicionalan predikaton, la faktitivon, kaj akuzativon de pronomoj (kp. E-o -in, -j, pli/plej, estas/is/os/u/us, -ig, -n) aŭ indiki ĉu la punkto-strekoj simbolas literojn aŭ numeralojn.

La sekvenca distribuo de la ne-frakcioformaj signoj rilate al la frakcioformaj ne ĉiam koincidas kun tiu de la Esperantaj finaĵoj kaj afiksoj rilate al la radikoj, ekz.: "fidela virino" tradukiĝas per la signoj respondaj al -a/fidelec- vir-/in. La verboj ĉiam tradukiĝas per formo de la verbo *esti* plus signo por substantiva participo plus substantiva "ideo", ekz.: "ni venis" respondas al sinsekvo kiel *mi/-j estis/ -anto/ven-/j* = "ni estis venantoj".

Analoge, ĉar en la pazitelegrafio de Ascoli la predikato estas akordenda genre kaj nombre, frazo kiel "la virinoj estis fidelaj" tradukiĝos *vir/-in/-j estis/a/fidelec/-in/-j*. Sufiĉe komplika estas la esprimo de la faktitivo: la koncerna signo ne respondas fakte al E-a *-ig-*, sed male al *-iganto*. Konsekvence, pro la interveno de la akordo-regulo la traduko de la frazo "ŝi liberigis enkarcerigitajn virinojn" sonas kiel *li/-in estis/-iganto/-at/liberec/-in/-j/-in -at/karcer/-in/-j = "ŝi igis liberigataj enkarcerigitajn"*.

La pazitelegrafia sintakso estas ĝenerale tre simila al tiu de Esperanto: prepozicioj, sama pozicio por epitetaj adjektivoj, relativaj propozicioj, negacioj ktp. La objekto ĉiam sekvas la verbon. Apartaj trajtoj: la akuzativo estas limigata al personaj pronomoj kaj pronom-adjektivoj (ekz. *tiu, tiu ĉi*) kaj ĝin indikas la sama signo por pasiva participo (E-e *-at*); tial "tiun homon" aspektas kiel *-at/tiu hom-*. Pro influo de la itala la akuzativo aperas ankaŭ kun prepozicioj, ekz. "al mi" (itale "a me", ne "a io") fariĝas *al -at/mi*. Denove pro influo de la itala, kelkaj prepozicioj postulas la intervenon de kromprepozicio tute specifa, ekz. "antaŭ mi" (itale "davanti a me, prima di me") sonas *antaŭ x -at/mi*. Kiel en la hebrea, la rilativoj koincidas kun la ĝenerala subjunkcio (E-e *ke*). Senpersonaj verboj ricevas specialan subjekto-pronomon. Plie, anstataŭ ununura adjektiviga signo (kp. E-a *-a*), speciala signo distingas ordajn numeralojn disde bazaj numeraloj kaj ekzistas 6 frakcioformaj signoj por la posesivoj. Fine kaj laste, la signoinventaro entenas ankaŭ la ekvivalentojn de *ĉu, mal-* kaj *re-*.

Konklude, oni povas aserti ke la "pazitelegrafio" de Ascoli, malgraŭ pluraj naivaĵoj kaj indicoj de tro hasta ellaboro en ĝi rekoneblaj, frapas pro sia geniece kaj praktikeco. Ĝi estas facile lernebla kaj aplikebla. Pro la memstareco, senŝanĝeco kaj kombinebleco de siaj elementoj ĝi povas esti rigardata kiel rudimenta formo de neparola Esperanto, uzebla nur telegrafie aŭ skribe.

Kvankam ĝi ne trafis sukceson, la "pazitelegrafio" estas tamen interesa atestaĵo pri planlingva projekto staranta en stadio kaj tempe kaj tipologie tuj antaŭ la lingvo de Zamenhof. Kaj laste indas konstati ke ne malmultaj estas la trajtoj kiujn la du junaj lingvo-aŭtoroj, Ascoli kaj Zamenhof, havis komune: ni nur menciu ilian freŝan kreivon, ilian maturan klarvidecon kaj la noblajn impulsojn kiuj ĉiam determinis iliajn elektojn.

#### NOTOJ

- <sup>1</sup> G.I. ASCOLI, *La Pasitelografia. Saggio di*, Trieste, Tipografia del Lloyd Austriaco, 1851, 8, p. 10.
- <sup>2</sup> En taglibro, je la dato 8.10.1851, Ascoli skribis: "Repreninte elanon por la pazitelegrafiaj meditadoj sekve de letero de D-ro Lolli, mi ne plu havas la esperon ke iun tagon la Pazitelegrafio fariĝos realaĵo, pri tio mi estas konvinkita", vd *Silloge linguistica dedicata alla memoria di Graziadio Isaia Ascoli nel primo centenario della nascita*, Torino, Casa editrice Giovanni Chiantore, successore Ermanno Loescher, 1929, p. XXXI.
- <sup>3</sup> Kp P.E. GUARNERIO, *Graziadio Isaia Ascoli*, en *Rivista di Filologia e d'Istruzione Classica*, 35,2 (1907) 225-256; bibliografio: p. 246-256; la pazitelegrafio menciigas en p. 246; *Silloge linguistica*, cit., biografio: p. IX-XXVII; P.G. GOIDANICH, *Ascoli, Graziadio Isaia*, en *Enciclopedia Italiana*, IV, 1929 (Istituto Giovanni Treccani), p. 817-819, ne mencias la pazitelegrafion; T. BOLELLI, *Ascoli, Graziadio Isaia*, en *Dizionario Bibliografico degli Italiani*, IV, 1962 (Istituto dell'Enciclopedia Italiana), p. 380-384, mencias la paz. en p. 380; B. GARAVELLI MORTARA, *Ascoli, G.I.*, en *Grande Dizionario Enciclopedico UTET*, II, 1966, p. 280-281, sen mencio; *Ascoli, G.I.* en *Grande Enciclopedia Vallardi*, II, 1968, p. 1662, sen mencio.
- <sup>4</sup> Vd *Silloge linguistica* cit., p. XXXIII: taglibro 7.7.1852.
- <sup>5</sup> Kp G. WARINGHIEN, *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*, La Laguna de Tenerife (J. Règulo eld.) 1959, p. 105.

## Fremdaj Elementoj de Esperanto Laŭ la vidpunkto de japanlingvano de Nagata Akiko

### 1. Enkonduko

Necesas unue konfesi, ke la verkantino, devene japanlingva, tute ne digestas la fakvortojn de la lingviko kaj ke ŝi neniam digestos ilin pro la poste menciitaj kialoj.

La afero temas ne nur pri la ne-digesto, sed ankaŭ pri la malemo al la lingvika vortaro, kiu grandparte aspektas tute fremde por ŝi, kiu estas samtempe ĉiutaga parolanto de Esperanto kiel hejma lingvo.

Necesas rememori ankaŭ, ke Esperanto akiris sian vivon ĉefe pro la jenaj karakteroj de la lingvo:

- a) formologiaj ecoj (gramatikaj finaĵoj montras la gramatikajn ecojn);
- b) strukturologiaj ecoj (i.a. la akuzativo - *n*, la eremo kaj la gluemo);
- c) sonologiaj ecoj (unu sono → unu litero; unu litero → unu sono; belsoneco, klarsoneco);
- ĉ) sencologia eco (unu vortelemo → unu nocio; unu nocio → unu vortelemo).

Tiuj ecoj, kiuj regas en Esperanto, estas konsiderataj kiel la ecoj necesaj por la tuttera lingvo. Aldonendas diri al la eŭroplingvanoj, kiuj rigardas la Esperantan alfabeton "sia" (eŭropa), ke ĝi estas eŭropdevena sed tipe Esperanta kaj supernacia pro la inventitaj literoj supersignitaj.

### 2. Esence "Erisma"

Zamenhof mem skribis: *Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn* (La Unua Libro). Tial eĉ la jena frazo povas ekzisti: *La ano misas ĉion ade pro ajna ino*.

Tio signifas, ke la formologia aspekto de Esperanto estas erisma, samtempe estante gluisma. La erismo evoluigas, ke ĉiu vortelemo posedu sian nocion. Kaj konsekvence, neeŭroplingvanoj povas atendi, ke ĉiu nocio havu sian vortelemonton, solan, aŭ kunmetitan vorton. Sen rigardo al la vortaro, la esencaj karakteroj de Esperanto estas senpropraĵaj, ankaŭ por la japanlingvanoj.

### 3. "Naturismo" = "Eŭropismo"

La naturismo, kontraŭ la skemismo, pledas por si ĉefe pro la vortika vidpunkto. La motivo por tio estas, ke lingvaĵoj devas esti kompreneblaj por ĉiu civilizita eŭropano (De Wahl) aŭ homoj lingve edukitaj (J.C. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, Roterdamo, 1978, p. 57) aŭ io simila. Ĉiuj ĉi kleraj homoj estas eŭroplingvanoj, ĉar iu klera aziano, kiu scias ekz. la ĉinan, japanan, korean kaj tajan lingvojn, ne povas rekoni automate la "naturisme" enkondukitajn novvortojn. Ofte por tiu homo multaj el tiaj vortoj estas ne nur ne-naturaj, sed "fremdaj". La verkantino eĉ kuraĝas aserti, ke la tiel nomata lingvika "naturismo"